

NIA FOLIETO.

JARA Abonprezo :

Eulande Fr. 1,25
 Fremdlande Fr. 1,75
 aŭ 7 respondkuponoj inter-
 naciaj, haveblaj ĉe la
 postoficejoj.

LA PROGRESO »

Esperanto-klubo

REDAKTEJO :

V. Hendriex
 Zalmstraat 43
 GENT — Belgujo.

KORESPONDDO :

Ĉiu dulinia anonco kostas
 du respondkuponojn.

Ĉiu abonanto rajtas fari
 unu enpresajon senpage.

Avizo al la kunlaborantoj : Ne subskribitaj artikoloj ne estas akcepteblaj. Se dezirinde oni aldonu pseŭdonimon publikigotan. Nur la subskribintoj restas respondaj pri la artikoloj enmetitaj. La artikoloj ne enserititaj ne estas retrosendataj.

La 9^a Belga Kongreso Esperantista.

(S^t Gilles — 23-24^{an} de Majo 1920.)

..... Sukceso neatendita !

Jen per du vortoj la ĝenerala impresio kiun ni tuj de la komenco eksentis : krom la fremdaj gesamideanoj kiuj honoris nian kongreson per ilia ĉeesto, la Belgaj gesperantistoj estis ankaŭ multnombro kuvenintaj ! Je kelkaj momentoj dum interparolado de Anglaj, Francaj, Nederlandaj kaj Belgaj gesamcelanoj ni sajnne ĉeestis internacietan kongreson ! Kaj la vetero do ! Ankaŭ ĝi kunfestis, kaj dum la kongrestagoj daŭre radie kaj ridante brilis super ni !

De la Norda stacidomo de Bruselo ni direktigis sekvantare al la kunveno : la malnova urbdomo de St. Gilles.

S^o Cogen anstataŭis kiel prezidanto S^{ro}a Witteryck, malhelpatan ; kaj malfermis la kongreson. Li rememoris pri la progresoj faritaj de Esperanto ĉiuflanke ; ankaŭ li rememoris respektive niajn kunbatalintojn mortintajn, komencante per kelkaj speciale kortusaj vortoj pri Nia Majstro D^o Zamenhof.

Interesaj raportoj estis poste legataj de la sekretario kaj de la kasisto de la Ligo Belga. Frato Ludoviko, estro de la Woluwe Blindulgrupo : Lumo et Mano, interesigis la aŭskultantaron je la sorto de la malfelicaj senviduloj, kaj legis skizon pri la Esperantomovado inter tiuj kompatindaj samideanoj.

Agrabla surprizo ĝojigis nin ĉiujn : S^o Otlet, ĝenerala sekretario de la « Unio de la internaciaj Asocioj », pligravigis la intereson de nia kongreso per sia honoriga ĉeesto, kaj esprimis sian plenan simpatian al nia afero !

Je tagmezo la kongresanaro aliris sekvantare la belegan urbdomon de S^t Gilles, kie S^o Bernier, skabeno de la publika instruado, akceptis nin oficiale je la nomo de la St. Gilles'a urbestro.

Li deziris plenan sukceson al nia unua postmilita kongreso, kaj konstatis ke la vivo de Esperanto estas fakte ne neigebla, ke male ĝi progresas daŭre pli kaj pli, kaj

ke la momento venis por enkonduki Esperanton en la oficialaj lernejoj. Plie li deklaris esti ema por proponi la provon de la urbaj lernejoj de St Gilles kaj fari tion eblan por ĝin sukcesigi. Rememorigu ni ankaŭ ke jam de kelkaj jaroj oficialaj Esperantokursoj okazas sub la aŭspicio de la Federacio Postlerneja de tiu urbeti, fama pro ĝiaj iniciatoj sur la pedagogia kampo.

S^{ro} Cogen, kongresprezidanto, esprimis al S^{ro} Bernier la sinceran dankon de ni ĉiuj, pro la tre afabla akcepto kiun ni ĝuis.

S^{ro} Paul Otlet poste, alparolis la kongresanaron, kaj, je la nomo de la Unio de la Internaciaj Organizaĵoj, anoncis ke katedroj por la studado de Esperanto kaj aliaj sciencoj pere de Esperanto estos kreataj ĉe la Internacia Universitato, fondota en Bruselo dum venonta Septembro, okaze de la Internacia Semajnoduo, kiu okazos en nia ĉefurbo. Kaj jen dua, grava fakto!

Post tiu neforgesebla akcepto, ni vizitis, mirigitaj, la belegan urbdomon de St Gilles, sub la lerta gvidado de S^{ro} Bernier. Kiajn ric'ajojn, kiajn arto'ojn tiu konstruaĵo enhavas! La urbestro bone komprenis ke artoj estas kurag'igotaj, kiel parto de la progreso!

Kaj sub la protekto (... kontraŭ la sunradioj...) de tiu impona urbdomo, ni grupiĝis por fotografado.

Kaj nun ni rapidu al la festeno!

Ĝi okazis en la bela ĉambrego de la restoracio St. Jean. Ĉeestis sesdeko da gesamideanoj. S^{ro} Cogen elparolis la unuan toston al la Reg'oj kaj al la ĝenerala Familio kaj proponis la sendon de la jena telegramo:

A Sa Majesté Albert, Roi des Belges,

Sire, les Espérantistes belges, auxquels se sont joints quelques amis étrangers français, anglais et hollandais, réunis en Congrès à St. Gilles-lez-Bruxelles, pour la première fois depuis le retour à la Paix, reconnaissants de la faveur que votre Majesté a témoignée déjà au mouvement espérantiste à diverses reprises, viennent d'acclamer un toast glorifiant V. M., vivante incarnation de courage et de fierté patriotique, S. M. la Reine Elisabeth, la bonne fée de nos héros blessés et la Famille Royale.

Ils souhaitent à Vos Majesté et à la Famille Royale, un règne long et prospère, pour le bonheur de la chère patrie belge.

Le Président,
L. COGEN.

Poste toastis S^{ro} Pétiau al S^{ro} Witteryck (kun sendo de telegramo), S^{ro} Mathieux al la fremdaj gesamideanoj, S^{ro} Boutwood al la Belgoj, S^{ro} Maertens al la Samideaninoj, F^{ino} Thooris, al la samideanoj; S^{ino} Cense eldiris toston al la Belgaj samideanoj mortintaj sur la batalkampoj kaj donis kelkajn klarigojn pri ili. S^{ro} Mathieux legis diversajn telegramojn (i. a. unu de S^{ro} Witteryck) kaj leterojn.

Al la Ekspozicio: organizita en la normala lernejo (bulvardo Lemonnier), de S^{ro} Direktoro Jonckere, ĝi ebligis al la vizitantoj konvinkiĝi pri la utileco, la disvastigo kaj la neceseco de Esperanto.

Al Lia Mos'to Albert, Reg'oj de la Belgoj.

Via Mos'to, La Esperantistoj Belgaj, al kiuj kunigis kelkaj fremdlandaj geamikoj Francaj, Anglaj, kaj Hollandaj, kunvenintaj en kongreso en St. Gilles apud Bruxelles, je la unua fojo de post la repaĉo, dankemaj pri la favoro kiun Via Mos'to jam montris je diversaj okazoj al la Esperantista movado, ĵus aplaudis toston glorigantan Vian Mos'ton, vivan enkarnigon de kurago kaj patrolanda fiereco, s. ian Mos'ton la Reg'inon Elisabeth, la bonfaran feino de niaj herooj vunditaj kaj la Reg'an Familion.

Ili deziras al Vian Mos'toj kaj al la Reg'oj Familio, regnon longan kaj felicigan, por la bono de nia kara Belga patrujo.

La Prezidanto, L. COGEN.

Gravaj dokumentoj ĉuispecaj estis orde kunigitaj.

Interesa kolekto da komercaj reklamiloj, leteroj pri komercaj traktadoj k. t. p. evidentigis la valoron de Esperanto kiel komerca helpilo. Nombra aro da gazetoj dece montris la nunan jam kontentigan staton de la movado. Pliaj dokumentoj pri turismo, kolektado, propagando, kaj specialaj dokumentoj pri Esperantismo, pravas la eniron de Esperanto en ĉiuj fakoj de la homa klerigo.

Por fini tiun unuan pleupleنان tagon okazis arta festo, dum kiu estis ludataj drama skizo: «Devo de Reg'oj», muzikaj'oj, kantaj'oj, kaj S^{ro} Mathieux faris interesan paroladon pri la milito, ilustrita per lumbildoj. Ĝi estis organizata de la Klubo «La Progreso» el Gento.

Post bonfara ripozo, la laboro estis kurage daŭrigata lundon matene. Post fakaj kunsidoj, ni direktiĝis al la Internacia Muzeo de la «Cinquantenaire», organizita je la 50a datreveno de la Belga Sendependeco. Kun ĝojo ni akceptis la afablan inviton de S^{ro} Otlet, kiu persone nin gvidadis tra tiu tute reorganizota Muzeo. Salonoj kaj salonegoj ricevos novan destinion: diversaj estos dediĉitaj al la jam citita Internacia Universitato. Iu salonego utilos al ĉuispecaj internaciaj kongresoj kaj... «Jen kie okazos la venonta kongreso de Esperanto»... rimarkigis al ni S^{ro} Otlet.

Vere interesa estas vizito al la verdira «Internacia Muzeo». Tie estas klasiĝitaj, laŭ ĝustegaj principoj, granda nombro da dokumentoj pri la internacia vivo de la homa spirito je diversaj vidpunktoj: lingvo kaj skribo, komunikaj rimedoj, ĉio ric'e klarigita per statistikaj aŭ diagramaj tabeloj. Ĉambro kie tiamaniere estas reprezentata la lukto de pacifismo kontraŭ militarismo, enhavas kulpigajn, diagramojn, kontraŭ militarismo hommang'anta!

Ĝi tie ni volas atentigi pli speciale pri la Esperanto-sekcio de la Internacia Muzeo: ĉiam per diagramoj, tabeloj, fotografaj'oj kaj realaj dokumentoj estas montrata la historio de la Internacia helplingvomovado. La progresoj, la venkoj de Esperanto tie vidigas. Ni ne povas ne noti ke ĉio en tiu Muzeo estas ordigata laŭ la fama, valorega decimala klasifiko. S^{ro} Otlet estas tre granda kompetentulo pri tiu scienca klasifiko, kaj li dediĉis pli ol dudek kvin jarojn el sia vivo al ĝi.

Ni ankaŭ devas atentigi ke, kvankam la Esperantofako ja estas interesa, ĝi povas kaj devas fariĝi pli interesa per ĉies kunlaborado, ĉar... pro la milito, ĝia ric'eco ne pligrandigis.

Ĉiuj eldonantoj, ĉiuj redakcioj, ĉiuj propagandistoj estas nepre petataj sendi ĉiujn dokumentojn kiujn ili publikigis, duoblekzemplere al la Esperantista Centra Oficejo, rue de Olichy, 51, Paris (Francujo). kiu antaŭe aranĝis la fakon, kaj kiu nun zorgos pri la ordigo, klasifiko, kaj lokigo en la Muzeo en Bruselo de ĉiuj dokumentoj ricevataj. Sendu do tuj, vi helpos la propagandon!

Kaj la lasta posttagmezo de nia plensukcesa unua postmilita kongreso estis agrable pasigita per ekskurso al Tervueren, kie, post vizito al la tiea muzeo, ni ripozis iomete en la freska, viviga aero de la parkego, kie S^{ro} Pétiau kaj Piens alparolis la gepromenantojn por rekomendi Esperanton, kaj ne sen sukceso.

Unuvorte la vojaĝo al... Esperantujo nin kurag'igis je nova laboro por la efektivo de la praktika uzado de Esperanto, kiun certe ni atingos.

La Belgaj gesesperantistoj ĉiulokaj do rekomencu la propagandon, reformu la dormantajn grupojn, kreu novajn, organizu kursojn! Jam, pro la Kongresa influo la Esperanta vivo brile rekomencis en Verviers! Do ĉiuj kurage kaj kune antaŭen al la venko!

AVIZO : De nun la redakcio akceptas abonmendojn por la venonta jaro : Sept. 1920 — Aŭg. 1921. Ploj versajne la prezo estas altigota, kaj dependos de la nombro da abonantoj. Ni do tre esperas ke ĉiuj niaj nunaj abonantoj montros al ni sufiĉe da sindonemo sendante al ni aligilan postkarton.

Jen formulo :

Mi intencas aboni al Nia Folieto por la jaro 1920-1921.

Nomo — Adreso — Subskribo.

Oni atentu ke ĉiu rekomendita sendaĵo devas nepre porti la nomon de nia redaktoro.

Deŭdua Universala Kongreso de Esperanto.

Den Haag (Hago) 8-15 Aŭgusto 1920. (Kvina komuniko).

PROTESTANTA DISERVO ESPERANTA okazos dum la posttagmezo de la 8^a de Aŭgusto.

DONACOJ ricevitaj sumigas kune je Fl. 501,65.

GARANTIA FUNDO. — Estas entute 19 enskriboj po 25 guldenoj = Fl. 475.

KONGRESELDONOJ. — Estas haveblaj : Kongrespostkartoj (kun la kongresejo Kavalira Salonego) je 5 intern. resp. kup. po 10, glumarkoj je 3 resp. kup. po 100, — ĉe S^{ro} J. Diehl, van Bassenstraat 27, Den Haag.

PASPORTOJ. — Nepre oni g^oustatempe zorgu pri pasporto; oni petu al la plej proksime log^oanta konsulo Nederlanda.

Estas jam nun (13^{an} de Majo) 113 partoprenantoj enskribitaj, reprezentantaj 14 diversajn landojn.

Nederlanda	43	Polujo	4	Germanujo	2
Anglujo	15	Svisujo	4	Italujo	2
Skotujo	15	BELGUJO	2	Norda Afriko	1
Francujo	12	Danujo	2	Svedujo	1
Hispanujo	9			U. S. A.	1

Komercistoj kaj Esperanto.

Tehdas-Osakeyhtiö Seres — Turku — (Finland.)

Ni ricevis prospekton de tiu Teknohemia fabriko : Ĝi aĉetas ĥemiaĵojn — vendas teknohemiajn preparaĵojn.

S^{ro} J. Schuster, Ringstr. 31/2 Eger, Bohemujo, deziras interrilati kun fabrikistoj de tabuloj kaj lernejmobilaroj, por de ĉiustata patentrajto pri speciala, tre praktika lernejtabelo, elpensita de li. La afero estas profitdona, konsiderante ke tiuj tabuloj nun estas ege bezonaj ekz. en Nordfrancujo, Belgujo, Italujo, Polujo, Jugon-Slavujo, k. t. p. Interesataloj aŭ peruloj tuj petu informojn!

La Belgoj prijug'ataj de Angla Samideano

Esperanto konigu la veron!

En la Maja numero de The British Esperantist, S^{ro} P. Blaise, de Belga deveno, pritraktas vojaĝon kiun li faris al Belgujo.

Krom kelkaj vojaĝimpresoj, (S^{ro} Blaise ekz. diras ke, kvankam Belgujo nur havas malgrandan loĝantaron kompare al Anglujo, li vidis pli da soldatoj en Brussel ol en London!), li ankaŭ pritraktas la vivkondiciojn kaj la Esperantan movadon.

Jen kelkaj allogaj rimarkoj pri la felic'a vivo en Belgujo : "... Ĉiu s'ajnas posedi sufiĉe da rimedoj por bone kaj agrabe vivi. Mono verdire s'ajnas esti senvalora! Ĉiu elspezas senpense, aŭ almenaŭ tiele s'ajnas al nova alveninto, kelktaga vizitanto... Malriculoj ne ekzistas! Ili malaperis!..." (Kaj tamen preskaŭ neniu Angla samideano nin vizitas por ĝui tiajn felic'ajojn!)

La cititaj paroloj enhavas parton veran : mono farig'is senvalora, kaj estas s'ajne, elspezata senpripense, sed tiu fakto nur estas pro la grandega kareco de ĉiuj necesaj-oj. Kiam oni ekz. eliras kun bankbileto por fari komision, oni revenas kun... malplena monujo, kvankam la provizujo nur enhavas malmulton! Estas fakto ke personoj, gajnantaj la vivrimedojn per honestaj laboroj, ne havas sufiĉe por facile vivi laŭ maniero antaŭmilita, spite la altaj salajroj ĉar tiuj lastaj certe ne estas la kaŭzoj de la karega vivo. Tiuj kaŭzoj estas pli profundaj.

Ĉu oni diris al S^{ro} Blaise, ke dume ke oni instigis nin, Belgojn, nenion aĉeti de Germana deveno, pro patriotismo, niaj Anglaj kunliganoj foraĉetis ĉion je la favoraj kondicioj kaj ofertis al ni laŭ kurzo eksterordinara?

Ĉu oni diris al li ke la Amerikanoj, unuj el niaj ĉefaj aĉetantoj de floroj, malpermesis la eksportadon de floroj, minacante interesan industrion de la Genta ĉirkaŭaĵoj?

Dum la militola senlaboruloj estis apogataj, certe sed, ĉu oni parolis al S^{ro} Blaise pri la tute ne enviinda stato de senlaborulo, ĉiam timanta la turmentegojn de la fremdula "rekviziciado"? Malfelic'e la tiel mortigitaj viktimoj restos mutaj!

La C. R. B. (Comission for Relief in Belgium — Komisiono por provizigo en Belgujo), per kiu S^{ro} Hoover akiris merititan famon utilis nesufiĉe laŭdirinde la Belgan popolon. Sed, ĉu S^{ro} Blaise aŭdis pri la panaco kiun ni gustumis dum milito, — tiam pro la cirkonstancoj, akceptebla —, sed per kiu post la milithaltigo oni "regalis" nin ankoraŭ, dume ke la militkaptitoj daŭre g^oadis antaŭmilitan tritikan panon. Kaj nunmomente, simila pano reaperas, ĝojiga memorajo! Ĉu ankaŭ S^{ro} Blaise ekaŭdis pri la mokomo kiun la popola humoro faris el C. R. B. ? "Centrale Roovers-Bende" — Centra Rabistoj-Bando, ĝi nomis tiun organizon por memori ke malgraŭ ĝiaj grandaj utiloj, ankaŭ multe "perdig'is ĉe la mezurilo kaj skrapilo" (1).

Vizito al Belgujo ja povas esti agraba, sed, kiel ĉie, la antaŭmilita stato ne revenis "... Esperanto malfelic'e estas preskaŭ forgesita en la lando...". Tie ĉi S^{ro} Blaise preskaŭ pravus. Ĉar... la milithaltigo, por tiel diri, ankaŭ haltig'is preskaŭ la movadon. En grupoj, kie la vivo dummilita estis kontentiga, pro la rapida stats'ango multaj gembroj forlog'is, aliaj reokupis sin pri laboro kaj mankis tempon, dediĉotan al Esperanto, kaj ĝenerale la indiferenteco, kaŭzita de la negativa agado de la Pacokonferenco (ĉu tiu malsukceso ne dependus, almenaŭ parte, de la lingvodiverseco de la kunvenintoj?) — la indiferenteco ĝenerala do, malfaciligis progreseman propagadon. Tamen "La Progreso", el Gent, faris ĉion eblan por revigligi la movadon, kaj ĉe entreprenis la taskon malfacilegan daŭrigi presite la eldonon de ĵurnalo, komencitan dum la milito, manskribitan tiatempo pro cenzuraj premoj.

Kaj tiamaniere la tutmonda Esperantistaro jam de preskaŭ unu jaro ricevas regulajn monatajn informojn pri... vivo Esperanta en suferanta Belgujo. HENDRIX V.

(1) Flandralingva proverbo por diri ke multaj disdonataj aĵoj ne atingis la celon, sed flankan destinion.

Bibliografio — Gazetaro.

Sub tiu ĉi rubriko ni preparolos ĉiujn verkojn, de kiuj du ekzempleroj estos senditaj al la redaktejo. Por unu ekzemplero anonco estos farata.

Esperanta Ligilo. —

Universala Gazeto por la Blinduloj. Redaktoro : Harald Thilander, Majorsgatan n° 12 ; Stockholm, Svedujo.

De Januaro lasta, tiu interesa, utila Ligilo inter Blinduloj ree aperas, kaj regule aperos ĉiumonate, dank'al iniciato de Sir Arthur Pearson, « rego en la regno de la blinduloj », kiu proponis al la Instituto, kies prezidanto li estas, ĉiujaran monsubtenon da 250 futoj sterlingaj. S^{ro} R. Mercy Merrick, kiu administras la mondonacon, decidis ke la abonprezo estu kalkulata kiel antaŭ la milito, t. e. « sen monvaluto », jene : 3 frankoj, 3 Finnaj markoj, 3 liroj, 2 ŝilingoj 6 pencoj, 2 kronoj Svedaj 20 öroj, k. t. p. laŭ la nacieco de la abonanto.

Vidinte kaj traleginte la revuon, ni nur povas instigi ĉiujn samideanojn konatigi niajn kompatindajn blindajn kunfratojn, kun tiu intereseza Ligilo, regula suaradio en la eterna mallumo, beninda konsolanto.

Ne nur ordinaraĵoj legajtoj trovigas en ĝi, sed ankaŭ kantoj, kun melodio kaj fortepiana akompano, s-akludoj, stenografia kurso (por plirapidigi la blindulan skribon), problemoj kaj enigmoj, k. t. p., krom korespondfako kaj regula informado de la Organizo inter blinduloj, sub rubriko « Nia Afero ».

RESPONDO de la Hungara Akademio al la ĉeĉka Akademio, Mimi, Ok Noveloj : recenzo en venonta numero.

Ni kore dankas pro la ĵurnaloj ricevitaĵ :

The British Esperantist	May 1920	Franca Esperantisto	Aprilo-Majo 1920
Bulgara Esperantisto	Jan.-Marto	Gregg Shorthand Mag.	May-June 1920
Le Chrétien Libre	Avril-Mai 1920	L'internationale Chrétienne	Mai 1920
Esperanta Finlando	Aprilo-Majo 1920	Közép Duna	10 Majo 1920
Esperantista Laboristo	Majo 1920	Laboro	Majo 1920
Esperanto (Bahia Blanca)	Febr.-Marto	Nederland-Esperanto	82-85
Esperanto (U. E. A.)	Majo 1920	Nova Tempo	April-Majo
La Espero	Aprilo 1920	Svisa Espero	Aprilo 1920
Fluganta Skribilo	Aprilo 1920		

KRONIKO

ANGLUJO. — Worcester : La Mezlanda Esperantista Federaciv kunvenis la 17an de Aprilo. Grupoj el diversaj urboj estis reprezentataj, kaj raportoj legataj. La Prezidanto Federacia, S^{ro} C. C. Goldsmith, preparolis la staton de la Federacio, kaj atentigis pri la ĵara kongreso de la Brita Esperanto Asocio, kiu okazis en Birmingham dum Pentekosto.

ĈEH-OSLOVAKIO. — La Esperantistoj kiuj intencas vojaĝi al Franzensbaden (Bohemujo) por resanigo per banuzo, renkontos ĉiam ĉe la tica parka koncerto (merkredo, ĵaŭde, sabate kaj dimanĉe) sindonan. Esperantiston: S-ron Josef Schuster. **Portu la steleton !**

FRANCUJO. — Paris : Sabaton la 8an de Majo okazis propaganda festo ĉe la sidejo de : Chrétien Libre, rue Git le Cœur. Ĉeestis 80 personoj inter kiuj Sroj Rollet de Lisle, Cart, k. t. p. Sro E. Adam paroladis, S^{ino} Chevallier, tre konata poetino deklamis belajn poeziojn originalajn. S-ro Barrier, talenta muzikisto, regalas la ĉeestantaron per originalaj muzikajtoj. Unavorte, sukcesplena festo.

BELGUJO :

Gento. — La klubo « La Progreso » organizas je dimanĉo la 1^{an} de Aŭgusto ekskurson la longe la upentrindajn riverbordojn de la « Zwalm ». Por pliaj informoj venu al la sidejo lundon la 26^{an} de Julio.

La parolado de Sinjoro A. Van Haute pri Spiritismo. —

Lundon la 17^{an} de majo okazis en nia sidejo la anoncita parolado de nia kludano S^{ro} Van Haute. Unue li faris interesan legadon pri tiu ĉi scienco : delokigo de tabloj, kaj perbatataj respondoj kiuj ĉu tute interesaj frivolaj aŭ malseriozaj laŭ la serioza aŭ neserioza sintenado de la ĉeestantoj, (...fakto tiel klarigita de la parolanto laŭ la aŭtoroj kiuj verkis pri spiritismo.) Poste oni komencis la eksperimentojn, nome la petadon al spirito movigi la tablon, s-ovigi ĝin ĉu dekstren, maldekstren, antaŭen, malantaŭen, doni difinitan nombron da trapoj ktp, kiuj facile estis obtenataj post kelkaj momentoj.

Poste S^{ro} Van Haute faris kelkajn demandojn al la spirito reganta. La respondoj tamen ne estis kontentigaj, ĉu pro la ĉeestantoj kiuj jen ekridis, jen ekbabilis, jen segobruis ? Farigis la 9 1/2 h. kaj la plej granda parto foriris. Restis tamen okopo kiu petis la mediumon repreni la eksperimentojn tre serioze kaj silente por ŝeble interrilati kun la spirito de samideano : mortinta klubano S^{ro} A. Konsentinte S^{ro} Van Haute petis al la spirito konigi sin. Tion li rifuzis kaj je peto « kial ? » la respondo estis flandralingve : « mi estis nekonata en la mondo » Poste oni petis ĉu estis eble interrilati kaj paroli kun nia karmemora klubano. La respondo estis : jes. Niaj koroj batetis, scivoleme ni atendis precipe post la demando ĉu nia amiko. A ne deziris ion komuniki al ni. Post jesigo, la tablo respondis : « Unu Dio, unu vero ! » Ho ! tiuj paroloj ! ni ekemociis, ni, kiuj konis tiel bone nian A : li personigis entute per tiuj ĉi kvar vortoj.

Inter la partoprenantoj estis persono kiu ege deziris interrilati kun siaj filino kaj edzino mortintaj. Al nia amiko A... la mediumo petis ĉu estis eble venigi la spiriton de la fraulino : jes. La patro faris kelkajn demandojn, ankaŭ ĉu la filino estis renkontinta sian patrinon, la respondo estis jes. Ni daurigis atente sekvaute la batadon sed kun premita koro kaj larmoj en la okuloj.

Je demando ĉu la fraulino havis ion komunikotan, la respondo estis : mi estas felicita, tiu ĉi lasta frazo per franca lingvo, kutime uzata de la junulino. Ni tre ege estas dezirintaj daurigi tiun interesan sed kortusan kunvenon, sed igis malfrue, enpense ni forlasis la sidejon enprofundigante en tiu ĉi mistera elmonro.

Ledeberg : Pro iniciato de la Ledeburga Grupo La Tagigo, estos organizata Esperantokurso ĉe la popollernejo, sub la aŭspicio de la « Taalclub » (Lingva Klubo).

Spa. — Ekspozicio : Okaze de la « Konferenco de Spa » estos organizata de la 20^a ĝis la 30^a de Junio, grava Esperanta Ekspozicio en tiu ĉi urbo.

Verviers. — La komitatoj de ambaŭ Esperantistaj grupoj el Verviers : « Esperantista Grupo » kaj « Inter Ni » kunigis ambaŭ grupojn. La nova societo kavas kiel titolon : « Esperantista Grupo Verviers » kaj la kunveno estas tiu de « Inter Ni » (Popoluniversitato : « La Mutuelle », rue Tranchée 50, Verviers). La unua kunsido okazis : gravaj decidoj alprenitaj. Sendo de gratulletero al la Honora Prezidanto S^{ro} Spinhayer, ĵus nomita urbestro. Alsendo de aperontaj artikoloj al la urbaj ĵurnaloj. Oni afable akceptos novajn grupojn de la aliaj Belgaj grupoj.

Woluwe-St-Pierre. — Blindula Grupo « Lumo en Mano » Direktoro : Frato Ludoviko. Blindula Instituto : Bly. d. Georges Henri, Woluwe-St-Pierre. (Bruxelles).

Pro manko de spaco ni ne citas la plenan liston de Belgaj societoj (kun kunvenoj) kiel kutime.

LETERSKATOLO

S^{ro} P. BLAISE. — Ĉu vi ne povus komuniki al ni la adreson de S^{ro} Frenkel? Ĉu per sekvanta « Letero el London » vi ne povus iom korekti tiun pri Belgujo? Informu ĉe B.E.A. pri Nia Folieto, ni petas.

S^{ro} P. FLAGEUL. — Sinceran dankon pro la represado de la artikolo!

S^{ro} J. PIRON. — Dankon pro la kunlaboraĵo. Daŭrigu!

S^{ro} J. PEREIRA. — Kunlaborado dankeme akceptata!

ESPERANTISTA CENTRA LIBREJO. — La redaktejo volonte ricevos ekzemplaron de la statutoj.

MONFONDAĴO POR NIA FOLIETO.

X.	Fr. 74,85
J. Héron	» 0,50
De bedaŭrinda sennomulo	» 10,00

Sume Er. 85,85

ANONCFAKO

Ĉiu abonanto rajtas fari unu enpresaj-on se npage.

Pliaj anoncoj kostas 0,50 fr. po linio.

CHARLES G. STUART MENTELH, Esperantisto 31, Upper Bedford Place, London WCI, England, deziras korespondi pri Esperanto komparata kun naturaj lingvoj. Interang'as Esp. gazetojn kaj glumarkojn.

S-ro F. CURTO BASTÉ, Calle Xifré 36 Barcelona, Hispanujo, deziras interang'gi ilustritajn postkartojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.

JUVELAĴOJ.

Speciala laborejo por riparado kaj fabrikado de juvelaĵoj. Oraj ringoj por geedziĝantoj laŭ mezuroj.

JOSEPH HÉRIION,

juvelisto, U.E.A.-V.D.

rue des Raines, 8, Verviers, Belgujo.

PASTELOJ SPA-GOUDRON.

Ĉiuj personoj kinj suferas je astmo, bronkito, tuso kaj tuberkulozo konvinkig'os pri sia resanigebleco per Pasteloj Spa-Goudron. Rekomendita specimeno sendata, kontraŭ 4 respondkuponoj, de

Ed. DESONAY, Place Verte 3, Spa Belgujo

S-ro ST-OROZOFF, instruisto de militblinduloj, Aleksandrowska, Bolnica, Sof'ia, Bulgarujo, deziras korespondi pretere kun instruistoj aŭ redukantoj de militblindigitoj, por reciproka els'ang'ado kaj informoj.

Kontraŭ 5 fr. aŭ 20 resp. kup intern. (rekomendite!) mi sendos 35 malsamajn postkarto:n pri Gent kun historiaj, geografiaj kaj turistaj notoj interesaj. Unuvorte: vojag'on tra Gent.

HENDRIX V., Zalmstraat 43, Gent.

« Nia Folieto » deziras seriozajn kunlaborantojn kaj korespondant in-on en ĉiuj landoj.

La abonantoj kiuj ne ricevas « NIA FOLIETO » 'n estas petataj atentigi la redaktejon pri tio.

Eldonas: « LA PROGRESO »

Koophandelsplaats, 11 Place du Commerce.
GENT Belgujo GAND.